the crew to communicate in English. Once the ship was repaired, its owners sold it to a European company. Within a week of its sale, it had another fire, now believed to have been set by a disgruntled crew member: 161 people died, most in their state-rooms or in smoke-clogged passages. Investigating the blaze, Norwegian authorities faulted the escape plan and preparedness of the crew, especially its crippling inability to communicate in a common language. (*Boston Globe*, Oct 26, 1997)

It is also helpful to travel with such as a *Berlitz, Greek For Travellers* phrase book, as, outside of the airport/Centre of Athens, you cannot guarantee to find anyone who understands or speaks English or French, whatever your language might be! (From a brochure published by “The New Humanity Centre” in Kalamata, Greece)

Following *National Geographic’s* example (see *Esperanto USA* 3/1997 p.9), yet another popular magazine in English has made its debut in Spanish – *People* has become “la nueva revista para latinos”. If “everybody speaks English” why was this necessary?

And yet another one: starting February 1998, *National Geographic* publishes an Italian edition which is subtitled “Rivista ufficiale della National Geographic Society”.

... Examples of English

In correspondence

We are publishing, for those who are interested, the «*Precis*» or «*Epitomo*» to the Universal Alliance in Esperanto, should you be able to help us distribute this publication to others in the world-wide Esperanto movement, this booklet, outlining the basic principles of the *Universal Alliance*, being, also available in

French and Greek, as available, here, at our Centre. (From a Press release from “The New Humanity Centre” in Kalamata, Greece)

To receive information on how to subscribe to *Hello Milano*, compile the coupon at right and send by post or fax to the address shown. (*Hello Milano*, Year 3, N° 5, 1-31 May 1998)

In tourism

The Carpathians form of mountains are in the centre of the country, bordered on both sides by hills and plateaux and finally the great plains of the outer rim. (From the 1996 *Catalog of the Romanian National Association of Travel Agencies*)

On the Menu

Cold shredded children and sea blubber in spicy sauce. (China)
Dreaded veal cutlet with potatoes in cream. (China)
Pork with fresh garbage. (Vietnam)
Fried friendship. (Nepal)
Buttered saucepans and fried hormones. (Japan)
Fried fishermen. (Japan)
Strawberry crap. (Japan)
Teppan yaki – before your cooked right eyes. (Japan)
Indonesian nazi goreng. (Hong Kong)
Roasted duck let loose. (Poland)
Beef rashers beaten up in the country peoples fashion. (Poland)
French fried ships. (Egypt)
Muscles of marines/lobster thermos. (Egypt)
Toes with butter and jam. (Bali)
Goose barnacles. (Spain)
Pork meat with sweat potatoes. (Moldova)

Det darn inglisch

(All examples below taken from *When Cultures Collide* by Richard D Lewis, Transcreen Publications, Riversdown, Hampshire)

in Germany

Next week I shall become a new car.
(get)

Thank you for your kidneys. (kindness)

What is your death line? (deadline)

in Japan

I have split up my boyfriend.

My father is a doctor, my mother is a typewriter.

I work hardly 10 hours a day. (hard)

in Portugal

What will you do when you retire? I will breed with my horses.

Butchers have been fined for selling monkey meat. (donkey)

in Sweden

Are you hopeful of any change? No, I am hopeless.

in Finland

We are sitting in the glass room.
(classroom)

He took two trucks every nights.
(drugs – pills)

He took a fast watch. (quick look)

How old is your son? Half past seven.

ESPERANTO IN THE MEDIA

“... Remedios de Varo y Uranga – daughter of the engineer Don Rodrigo Varo y Zajalvo [...], devotee of Esperanto”... “Remedios’s father was a freethinker and even an advocate of Esperanto, which for that era meant freedom of thought.” (Remedios Varo – *Catalogue Raisonné*. Mexico City: Ediciones ERA, 1994)

Martin Gardner dedicates a whole chapter of his book *The night is large* (New York: St. Martin’s Press, 1996) to *Klingon and other artificial languages*, among which obviously Esperanto is mentioned – even in a positive way.

Alexander Schwartz, a freelance translator and former staff member at the UN, declares about Esperanto in *ATA [American Translators Association] Chronicle* (Sep 1997): “It’s the easiest language in the world – it’s designed, of course, to supplement natural languages, not replace them. I learned it in about a month when I was 17, not only to read but to speak as well, with the help of a friend who had graduated from Stuyvesant the year before I did. When we worked together at the computer lab, we always spoke Esperanto at lunchtime. It’s a very practical language, one which I used in my UN work, and at the same time it’s extremely expressive for literature purposes. Poetry in Esperanto translation can be every bit as good as the original – and sometimes better.”

Daily Hampshire Gazette (Feb 10, 1998) dedicated an entire column to ... *Esperanto at the [Hampshire] mall*, where ELNA member Sally Lawton is teaching an Esperanto class.

En somera vilao won’t be a blockbuster opines Paul Murphy in *The Japan Times* (Feb 19, 1998) about the low-budget film that the Japanese Esperanto Institute is working on. In spite of his less than optimistic opinion about the 30-minute film, Paul Murphy wrote a quite balanced material in *Esperanto boosters still hopeful*.

The Alpharetta Neighbor (Mar 11, 1998) featured a picture of ELNA members Clyde Price and Joel Amis accompanied by a short text describing their success in the Esperanto field. In honor of L.L. Zamenhof’s birthday, the mayor of Atlanta GA declared December 15 1997 “Esperanto Day”.

“Phil Costa, an analyst with Giga Information Group in Massachusetts, likens the Java-Windows battle to

the effort to make Esperanto the world’s spoken language. It failed. English became the international language because so many people used it. [...] But don’t assume that Java will go the way of Esperanto. Rather, like spoken languages, computer languages either prove useful or they die.” (*San Francisco Chronicle* Mar 12, 1998, p. E3). This generated a letter from Miko Sloper (Mar 25, 1998, p. B3), in which the author invites the readers to take a look at ELNA’s webpage and to attend the SFSU Esperanto Workshop.

In a cartoon by Warshaw & Shaffer featured in *Christian Science Monitor* (Mar 17, 1998) Esperanto appears along other “endangered species” in this country like health care, metric conversion, and palm oil imports.

Here, Bern Stollman, this one is for you: “The uniform packing of the EPs issued by Sonic Youth Records, and the Esperanto titles of this third release in the series, could be read as a tribute to ESP, the great American label and home of countless misfits.” (*The Wire*, Mar 1998, p.61)

The latest issue (#63) of *Factsheet 5* (San Francisco CA) reviews three Esperanto periodicals: *ELNA Update*, *Rok-gazet’* and *Esperanto USA*, the latter accompanied by a picture of its issue #2/1997.

In a review of *SYR3* (see *Esperanto USA* 2/1998, p.9), Mark Athitakis states that, “Like Esperanto, which inspired the song titles, it voices a pointlessly invented language few care to speak in, let alone hear.” (*SW Weekly*, Apr 8-14, 1998, p.35)

A piece of advice from *Christian Science Monitor* (May 19, 1998): “Forget French – Latin, Klingon and Esperanto are all the rage”. Yes, this is the title of a very interesting article by Lee Lawrence dealing with language issues including Esperanto.

RECENZE

La majstro kaj Margarita. Mihail Bulgakov. Tradukis Sergej B. Pokrovskij. 376p. 195x140. Malmole bindita. *Serio Oriento-Okcidento* n-ro 26. Sverdlovsk (Jekaterinburg): Sezonoj, 1991. Ĉe ELNA: kodo: MAJ003, prezo: \$25.90

Imagu la realan Moskvon de ĉ. 1930. Aldoniĝu duonkaŝita Satano kaj ties servantoj per serio da magiaĵoj renversante la urbanojn, plus modernaj tipoj de Faŭsto kaj ties Gretchen. Rilatigu la tuton al la ekzekuto 1900 jarojn pli frue far Poncio Pilato de la profeto Jeŝua Ha Nocri en la urbo Jerŝalaim. El tiu miksaĵo estiĝis romano **La majstro kaj Margarita** (de nun, *M k M*).

M. A. Bulgakov (1891-1940) estis dum mallonga tempo kuracisto, poste literaturisto: interalie, dramisto kaj prozisto. Li verkis ĉi tiun, sian lastan romanon inter 1928 k 1937. Sed iom post iom okazis, ke mankis al li politika praveco dum tiu stalina epoko. Finfine aperis la unua ruslingva eldono en la lastaj 60aj jaroj (en literatura revuo) kaj, en tiu tempo kaj poste, tradukoj diverslingvaj.

La intersaltado inter eventoj memorigas pri tiu de alia ruso de tiu epoko – Vladimir Varankin, kiu verkis en Esperanto sian satiran **Metropoliteno** (1933; 3a eld. 1992). Interalie, ambaŭ verkistoj utiligas planon de “romano en romano.” La tutromana skemo de Varankin estas malpli komplika ol tiu de Bulgakov. Sed en ambaŭ verkoj estas malfacile ĉiam esti certa pri la lokoj kaj la realeco de la situacio.

Por esperantistoj, la tri kulturaj fonoj de la romano do estas la verko de Varankin, **Faŭsto** de Goethe kaj la Nova Testamento de la Sankta Biblio. Eble la varankinan verkon Bulgakov ne konis, sed ambaŭ moskvaj

aŭtoroj sendube ĉerpis ideojn kaj stilaĵojn el similaj spertoj. Pli certa fonto por Bulgakov estis la ideoj kaj verkoj de N. V. Gogolj, kun ties groteskaĵoj kaj absorba zorgo pri la diablo.

M k M ofte ne distingas inter realo kaj fantazio. Partoj ŝajnigas, pro la strangaj kapriolaĵoj, kvazaŭ oni estas en sonĝo. En la angla oni trovas similan efekton en **Alico en Mirlando**. Sed ĉi tiu miksaĵo el Ruslando memorigas al ni en Usono ankaŭ stilaĵojn de iu nia propra humoristo: la en 1993 forpasinta Harvey Kurtzman, homo de rusjuda deveno, kiu en 1952 ekprezentis al ni la revuon **Mad**.

Ne ĉio en *M k M* estas fantasmagorie freneza, kapriola, pajaca. La ĉapitroj pri la ekzekuto de Jeŝua kaj la postaj okazoj estas plejparte sombre seriozaj: kiel, ekzemple estas la romano de Lloyd C. Douglas, **The Robe (La ĥitono)**. Sed eĉ en tiuj partoj troviĝas humuraĵoj. Ekzemple: Tiu Jeŝua raportas, ke antaŭ lia aresto ĉiam akompanis lin la impostisto Levio Mateo, ĝene kaj diligente skribante (kaj miskomprenigante) la vortojn de sia elektita Majstro.

Ree al la numtempo (de ĉirkaŭ 1930): La agado okazas en spaco de kvar tagoj. Inteligenciano M. A. Berlioz, redaktoro de literatura revuo, renkontas fremdulon, kiu antaŭvidas lian tragikan morton. La morto ja okazas postnelonge. Daŭre estiĝas aferoj nerealecaj: Direktoro de teatro subite sin trovas en Jalto. Mono aperadas laŭ strangaj circumstancoj kaj poste malaperas aŭ ŝanĝiĝas. Berlioz anoncas sian mortintecon al sia onklo per telegramo. Margarita kaj la servistino eltrovas kapablon sorĉistине traflugi la aeron balaile. Kaj inter la stranguloj troviĝas ĉiam ĉie iu granda nigra kato, kapabla komforte sin enigadi en homajn aferojn.

Interesa grafika stilaĵo estas, ke en vortkunmetoj kie la dua radiko komenciĝas per vokalo, ĉiam aperas dividita apostrofo: roz’odoro, buŝ’angulo, oliv’arba ktp. Tiu tiparanĝo ne nepre necesas, sed ĝi ja faciligas la legadon kaj diversloke evitigas konfuzon.

Troviĝas fine de la libro ampleksaj Notoj, kun klarigoj pri historiaj fonoj ktp. Tre lerte la tradukisto klarigas por ni la signifojn de diversaj vortludoj en propraj nomoj: en la rusa originalo kaj eventuale en la traduko. Li klarigas la detalojn pri sia esperantigita nomsistemo: kiamaniere li decidis inter nura transliterumo kaj laŭsenca traduko. La tuto povas stari kiel modelo por eventualaj aliaj tradukistoj el iu ajn lingvo. Multajn vortklarigojn li prezentas en la originala rusa, cirile skribita, kaj ankaŭ en la aliaj fontlingvoj. Tio vere helpas al homoj kapablaj almenaŭ legi tiujn lingvojn. Tiuj, kiuj ne kapablas legi, rajtas preteratenti la detalojn.

Mi sentis nur du ĝenojn pri la Notoj: (1) Ene de la teksto mem ne troviĝas indiko, ke ekzistas noto pri iu aŭ alia detalo. Oni devas do daŭre paĝturnadi por kontroli pri tio. (2) En kelkaj lokoj la notoj ne aperas ĝuste laŭ la sinsekvo de la teksto.

Inter la jamaj recenzintoj estas Alexander Z. Shlyafar (**Esperanto**, 1993(1), pp. 13-14). Li trovas la tradukon “enciklopedie klera” kaj “praktike senriproĉa.” Mi povas konsenti, ke eventuala konfuzo estiĝas ne pro mallertaĵoj en la tradukado, sed pro la strukturo de la romano mem kun ties saltado tien kaj reen inter realo kaj nerealo.

Shlyafar diras ankaŭ, ke “la traduko estas egalvalora kun la originalo.” Kaj en la Enkonduko, Spomenka Ŝtimec diras, ke ĝi “foje superas la lingvaj limojn de la rusa, en kiu la verko estis kreita.”

Bedaŭrinde, mi ne estas sufiĉe ka-

pabla en la rusa por mem fari kleran komparon. Sed mi tralegis partojn de unu el la du anglalingvaj tradukoj (la necenzurita, tiu de Michael Glenny, Harper & Row, 1967). Legante ambaŭ tradukojn, mi ja sentas iom da diferenco en perspektivo kaj mensbildado. Glenny retenas la nomon de unu protagonisto kiel *Bezdomny*. Pokrovskij tradukas laŭ la senco, *Senhejmulo*. La centurio *Krysoboj* estas en la angla *Muribellum* (kiu estus la ĝusta latina nomo) sed en la esperanta *Ratobuĉulo*. Alia grava persono aperas en la angla kiel *Koroviev*, sed en la esperanta kiel *Kerubjev*. La esperanta derivaĵo taŭge kaptas vortludon en la originalo, kiel klarigas la noto (ĉap. 9.5).

Aliloke: En ĉap. 17, "Malkvieta tago", homoj en konstruaĵo malvolonte komencas kanti faman kanton alterne en ĥoro. En la angla la kanto estas evidente "La volgaj boattrenistoj". Sed en la originalo ĝi estas "Ho glora maro", popolokanto pri fuĝanta punlaborulo. Ĉi tie, mi devas diri, ke la tre fama "Vulgaj boattrenistoj" pli frapas al anglalingvuloj. Ŝajnas, ke Glenny faris taŭgan anstataŭon por la celataj legantoj. Kiamaniere impresas pli ĝeneralan, internacian legantaron "Ho glora maro", mi ne kapablas diri.

Jen do romano ĝuebla laŭ diversaj niveloj kaj celoj: kiel distra (sed eble konfuza) amuzaĵo; kiel mensostreĉa studo de diverstavolaj alegorioj; kiel studo de traktado de propraj nomoj. Tradukinto Pokrovskij diras, ke ekzistas tri planoj en la romano. Enkondukinto Ŝtimec trovas "du paralelajn rakontojn." Almenaŭ unu alia komentariinto kalkulas kvar komplotaĵojn. Vi rajtas mem legi kaj decidi pri la afero. Kaj, finleginte, vi eble povos respondi al la demando, ĉu la faŭsteska paro vere estas tiom centrigita en la libro, ke ili tiel meritatis fariĝi ĝia titolo.

Plukompare (aŭ eble pli tempoŝpare), vi povos regali vin per 26-paĝa *poezia* versio en Esperanta traduko de Kris Long. Mi mem legis *M k M* pro tio, ke ĝi estas ero en la serio Oriento-Okcidento. Multajn penajn horojn mi prilaboris tiujn librojn, kun laciga sento ke mi fariĝadas homo pli klere internacia. Mi invitas vin fari la samon.

Reginald JADERSTROM (Mililani HI)

Hura-a-a-a. Daniil Harms. Tradukis Natan Procenko. 32p. 295x205. Broŝurita. La Kromkancerkliniko 9. Thaumiers: La Kancerkliniko, 1991. Ĉe ELNA: kodo: HUR002, prezo: \$4.80

Jen vere ĝuinda legaĵo, kiu povas plivastigi literaturan kaj intelektan horizonton de ĉia leganto. Plej simple (kaj iom supraĵe) oni povus karakterizi la ĝenron kiel specon de kanton-rompa literaturo. Temas pri originale ruslingvaj prozaj miniaturoj de Daniil Harms, unu el la fondintoj de "Unuiĝo por Reala Arto", literatura grupo siatempe malpermesita en la stalinisma Sovetio. Harms sendube estas unu el la plej originalaj verkistoj – eĉ nun liaj verkoj impresas kiel freŝaj kaj intelektu liberigaj. Imagu kiom hereza estis la moka, sarkasma kaj absurdiga stilo de Harms siatempe en la lando, kie "socialisma realismo" establiĝis kiel la sola akceptebla literatura doktrino kaj metodo.

La traduko estas ĝenerale bonega – kelkaj lokoj estas veraj majstraĵoj de tradukista inventemo. Aliflanke, ofte la tradukinto penis rekte transdoni aŭ konservi elementojn de la originalo, kiuj ne estas senpere kompreneblaj por alilingvanoj. Ekzemple, la vortordo ofte sekvas la tipe rusan vortordon pli proksime ol – miaopinie –

klareco de kompreno kaj strebo al stila ekvivalenteco normale permesus. Iom ĝena estas ofta ellaso de subjekto en frazoj, kio estas kutima kaj pravigebla en la rusa, kie la verba konjugacio senambiguigas tian elipson.

Kelkloke estas iom malfacile orientiĝi en la iom gazetstila enpaĝigo, ekzemple, sur paĝo 11 mi ne sukcesis trovi la komencon de fragmento, kiu komenciĝas per parto numero 5. Ankaŭ preskoboldo ne malatentis tiun ĉi eldonon. Tamen sufiĉe multaj preseraroj aŭ mislingvaĵoj ne tro ĝenas la komprenon, krom en nemultaj kazoj, kiam ili ŝajnas intencaj.

Sed – kiel oni ofte ripetis en Sovetio – "apartaj mankoj, renkonteblaj kelkloke" ne malpliigas la valoron de tiu ĉi leginda eldonaĵo. Jen do kelkaj specimenoj:

Vivis rufulo, kiu malhavis okulojn kaj orelojn. Ankaŭ harojn li malhavis, tial oni nomis lin rufa nur konvencie...

Sekva citaĵo estas kompleta miniaturo:

RENKONTO

Foje iu homo iris al la oficejo kaj survoje renkontis alian homon, kiu post aĉeti polan panbulkon iris hejmen. Jen, precipe, estas ĉio.

Jen plia citaĵo, tute hazarde havanta neatenditan kromsencon en Esperantujo:

DEMANDO

– Ĉu ekzistas io sur la tero, kio havus signifon kaj povus ŝanĝi la iron de eventoj ne nur surtere, sed ankaŭ en aliaj mondoj? – demandis mi la Majstron.

– Ekzistas, – respondis la Majstro kaj subite eksilentis.

Sed kial mi plu citu? Mi lasas al la legonto la plezuron frandi mem!

Aleksandro SHLAFER (Burlingame CA)

ALVOKO

Cathy and Bill Schulze are well known names in Esperantujo. Now a small group of samideanoj are collecting material for a memory book, with plans to present this book to Cathy on her 85th birthday in November. The group is looking for contributions of many kinds from friends of the Schulzes, old and new. These contributions could include narratives or anecdotes in English or Esperanto, humorous or historical, with poetry and/or photos – items that share the contributor's most precious memories of the Schulzes. There will be no limit on words or pages, (however, 8½x11-one side only is preferred for the album); the photos can be original or copies. Information on places and dates would be helpful (although the group realizes that memories are timeless). No contribution will be returned. If members or friends wish to have their contribution included in this project, they are asked to send the materials ASAP to: Dori VALLON WHEELER, PO Box 74, Goldendale WA 98620. For details please contact Dori at ☎509/773-3254, or by e-mail at: dvwheeler@gorge.net.

MENCIINDE

Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto (AAIE) havas kiel membrojn “profesiajn edukistojn (aktivajn aŭ pensiitajn), kiuj interesiĝas pri Esperanto kaj neprofesiuojn, kiuj instruis, instruas aŭ intencas instrui Esperanton”. Se vi apartenas al unu el la ĉi-supraj kategorioj kaj ankoraŭ ne estas membro de AAIE, petu informojn pri ĝi de Dorothy Holland, 5150 Lorenzo Dr, Santa Barbara CA 93111; bonvolu sendi adresitan kaj afrankitan koverton aŭ, el eksterlando, Internacian Respond-Kuponon.

Se vi ankoraŭ ne sendis vian kontribuojon por la baldaŭ aperonta *Literatura suplemento*, ni instigas vin fari tion antaŭ la fino de junio.

ĈU MI ESTAS NAIVA?

La familio Bonvolo, pri kiu vi tiom legis lastatempe en ĉi novaĵletero, ja meritas sian nomon: ĝi bonvole laboras, elspezas la proprajn tempon kaj energion; faras, refaras, faradas laŭ siaj povoj ĉion eblan por doni al la ceteraj (sinteno tipe Esperanta) ion plej bonan.

Kompreneble, ĝi estas parto de io pli granda – la Esperanta familio, la homa familio, sen kiuj ĝi ne havus kialon kaj eblecon ekzisti. Ankaŭ tiuj ĉi du grandaj familioj helpis, laŭ siaj eblecoj, la bonvolanojn. Tamen (ĉiam devas ekzisti iu tamen), tiu helpo povas kaj devas esti pli signifa.

La Esperanta kaj homa familioj estas tutmondaj, kio malfaciligas ilian rektan partoprenon en nia projekto, kvankam – kiel rimarkeblas – la membroj de la familio Bonvolo devenas de diversaj nacioj, de pluraj kontinentoj. Estus praktike neeble venigi ĉiujn volontulojn, bonvolulojn en la najbarecon de la familio Bonvolo, dum tiu ĉi laboras por plenumi siajn promesojn. Tamen (refoje), tiuj kiuj ne povas esti apud/ĉirkaŭ la Bonvola familio, povas helpi ĝin per tio, kio plej mankas al idealismaj familioj – mono.

Ĝenerale, esperantistoj ne estas aparte riĉaj. Malgraŭ tio, ili sukcesis traŭvojaĝi longan vojon, ne ĉiam facilan, kaj atingi la nunan nivelon, neniel neglektindan. Tio necesigis ankaŭ monon. Monon, kiu venis aŭ el la propraj poŝoj, aŭ el la poŝoj de tiuj, kiujn oni sukcesis konvinki pri la utilo de nia laboro.

Estas mia konvinko, ke ie tie, ekster la familio Bonvolo, ankoraŭ troveblas iom da mono por helpi la bonvolanojn havigi al ni ĉiuj (ne nur esperantistoj), fine de ĉi jarmilo, la longe mankantan instrumaterialon, kiun ni ĉiuj sopiras. Bonvolu montri al mi ke mia konvinko ne estas simpla naivaĵo. Dankon.

Ionel ONET

NORTHWARD HO!

Our convention this year will be in the beautiful Canadian city of Montreal, where the participants will be richly international. I hope that everybody who will be en route to Montpellier can stop off in Montreal for a bit of immersion in French culture; and that those who can only dream of visiting Montpellier can at least experience some of the joys of the international Esperanto culture in Montreal. Normand Fleury is the head of the Canadian team which is cooking up a spicy gathering. He has organised some excellent meetings already in Vermont as well as in Canada, so we can rest assured that the arrangements will be splendid. Tom Eccardt is in charge of the main event scheduling, so be sure to contact him with your proposals for workshops, lectures, etc. I hope that all fans of Esperantio's most popular folk music group Kajto will make a special pilgrimage to hear them perform live at the convention. I had the great pleasure of singing along as part of the chorus for their upcoming CD; and I have heard them perform live four times. They are splendid performers whose warmth and charm are unmistakable and irresistible. Prepare to sing along on the refrains from texts displayed on banners. And serious fans of Kajto should seek out appearances of the Dutch/Frisian shanty-singing group called Kat yn't Seil: it's the same singers with a different repertoire. They are touring the north Atlantic seaboard and upstate New York and singing in festivals and at museums. Details of their tour schedule are available on request. Their most important date is July 25, when they sing for us! Don't miss them!!

Miko SLOPER



VOJAĜU KUN LA FAMILIO BONVOLO

Usonanoj ĝuos la Eŭropecon de Montrealo. Ĝi estas la dua plej granda franclingva urbo en la mondo, kaj ĝi ege taŭgas por nia kongreso ĉijare.

La estraro kunvenos tutan tagon la 24a kaj vespere okazos interkona renkontiĝo. Ĝuu interesan programon, inkluzive duon-tagan viziton en Montrealo, bankedon, kaj koncerton de la fama Esperanta ensemblo "Kajto". Elektbla estas tut-taga ekskurso al Kebeko, eĉ pli franceca urbo kaj regiono, je 28a julio.

Montrealo estas sekura, bela urbo kaj varme anticipas nian viziton!

Survoje al Montpellier ne estos okazo prezenti *Pasporton*, sed la kasedoj por montri ĉe la UK jes vojaĝos kun ni.

Antaŭkongresa Vizito Riviero kaj Provenco

27 julio - 1 aŭgusto

De Menton ĝis Toulon, la Riviero inkluzive Nice kaj Monaco estas taŭge famaj pro siaj elstaraj pejzaĝoj kaj milda klimato. Nia grupo komencos tie ĉi, pluirante al Provenco, kiu kombinas historiajn lokojn kun la plej bona manĝaĵo en Francio. Lilakoj kaj parfumoj; spicoj, manĝoj kaj vino; la speciala lumo kaj atmosfero kiu donis al la Impresionistoj iliajn inspiron, kaj la belega varma kamparo de Suda Francio. Grasse, Aux-en-Provence, Avignon, Cezanne, Van Gogh, Gauguin! Kia ĝojo!

83a Universala Kongreso Montpeliero, Francio

Ĉe Montpeliero kaj ĉe la ILEI kongreso, pli da personoj ekscios pri la Familio Bonvolo!

Esplorado de la kongresa temo, "La Mediteraneo: Ponto inter kulturoj", ebligos pli bonan komprenon de la kulturo de ĉi tiu mondoparto, kaj samtempe esploros la rolon de nia propra interkultura ponto, Esperanto.

Montpeliero estas unu el la malplikonataj juveloj de Francio. Kaj tre Franca ĝi estas, de la krenelaroj de la antikva urbo ĝis la muroj de la

plinova Grek-aspekta Antigone. La nova aldono, konata loke kiel la "Anti-Gone", estis konstruita kiel reago kontraŭ la ultramoderna giganta subtegmenta butikarego konata kiel la "Poligono".

Ho, kiel tipe France!

Poste, dum la

Postkongresa Ekskurso:

Ekzotika Francio - 9-16 aŭgusto

ni prezentos ekzempleron de *Pasporto* al Kastelo Gresillon kie ekskursanoj restos 2 noktojn.

De Montpeliero nia grupo iros tra Narbonne ĝis Carcassone, la duoble-murigita fortikaĵa urbo kiu donas perceptojn en 15 jarcentojn da tumulto. Plu tra Albi, la naskiĝloko de Toulouse Lautrec, kaj la montetpinta urbo de Cordes, en la valon de la rivero Dordogne, flankigita per mezaĝaj kasteloj (*chateaux*); ankaŭ la kavernoj kie vivis Homo-Cro-Magnon. Ni vizitos elegantan Bordeaux. Ĉi tiu viveca kosmopolita urbo reliefigas la plej bonan vinon en la lando kaj iujn el la plej bonaj ekzemploj de 18-jarcenta arkitekturo en la nacio.

Ni finas en Parizo post vojaĝo tra Tours kaj la chateau-regiono. Francio estas ĝojiga lando viziti, kaj vojaĝi kun Esperantistoj el multaj nacioj almetas specialan guston al la vojaĝo.

8a Internacia Esperanto-konferenco

6-12 novembro: San Francisco, Los Angeles, San Diego. Post-kongreso en Havajo 12-19 novembro. Vojaĝoj per publikaj transportoj, ĉarteritaj flugoj kaj restadoj en gastejoj.

Temo: "Turismo kaj Pasporto al la Tuta Mondo." Prezo estos kompare malaltaj, kondiĉoj tre modestaj.

La Familio Bonvolo petas vian kontribuadon al *Esperanto, pasporto al la tuta mondo*. Helpu al ĝi krei Esperantistojn mondwide! Sendu donacojn aŭ mendojn (\$85 por la unuaj 4 lecionoj, aŭ \$325 por ĉiuj 15) al ELNA.

Nia videokurso por instrui Esperanton jam komencis multajn vojaĝojn ĉirkaŭ kaj tra la mondo. La unuaj 4 lecionoj de *Esperanto, Pasporto al la tuta mondo* jam alvenis ĉe aĉetantoj en preskaŭ ĉiuj mondpartoj. Reagoj estas tre pozitivaj.

La familio Bonvolo kaj la aliaj bonvoluloj invitas vin vojaĝi kun ili ĉijare:

Unue al -

San Francisko Ŝtata Universitato

5-24 julio - 3-semajna intensiva multnivela kursaro estas la plej bona en la mondo. *Pasporto al la tuta mondo* estos uzata tie ne nur por instrui komencantojn, sed ĝi ankaŭ amuzos pli spertajn Esperantistojn. La instruistoj estas Aleksandr Shlafer (Rusio/Usono); profesoro John C. Wells (Britio), antaŭa prezidanto de UEA; Katalin Smidéliusz (Hungario); kaj Kanae Hirose (Japanio). Se eble kaptu la okazon pli bone lerni Esperanton kaj ĝui la etoson de San Francisco - kaj ĝui la eblecon esti inter bonvoluloj de ĉirkaŭ la mondo.

Dum la klasoj ĉe SFSU, ni daŭrigos la aŭdacan projekton per filmado de sekvaj lecionoj de *Pasporto al la tuta mondo*.

Poste *Pasporto* estos prezentita ĉe

46a Jarkongreso de E.L.N.A.,
24-27 junio - Montreal, Kanado

Esperanto Vojaĝ-Servo
6104 La Salle Avenue
Oakland CA 94611
[510] 339-2001
Fax [510] 531-0152
LusiHarmon@AOL.com